

NE, MI NE DIRAS AL VI ĜIS SEP FOJOJ, SED ĜIS SEPDEK SEP FOJOJ

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Mateo 18, 21-35

En tiu tempo Petro alproksimiĝis al Jesuo, kaj demandis: "Sinjoro, kiomfoje mi pardonu al mia frato, kiam li ofendis min? Ĉu ĝis sep fojoj?". Jesuo respondis al li: "Ne, Mi ne diras al vi ĝis sep fojoj, sed ĝis sepdek sep fojoj.

Ĉar tia estas la regno de la ĉielo: Iu reĝo decidis kontroli siajn administrantojn. Ĉe la komenco de la ekzameno oni kondukis al li unu, kiu estis ŝuldanto por dek mil talentoj. Sed tiu ne plu havis monon, per kio pagi; pro tio la reĝo ordonis, ke estu vendataj kiel sklavoj li, lia edzino kaj liaj infanoj, kaj konfiskata ĉio, kion li posedis kaj tiel pagata la ŝuldo. Tiam la servisto genuiĝis antaŭ li, petegante: "Sinjoro, paciencu pri mi, kaj mi pagos al vi ĉion". Kortuŝite la reĝo liberigis lin kaj kvitigis lin de la ŝuldo.

Sed elirante, tiu servisto renkontis kunulon, kiu ŝuldis al li malgrandan sumon; kaj li kaptis tiun ĉe la gorgo, kvazaŭ sufokante lin, kaj diris: "Pagu ĉion, kion vi ŝaldas al mi". La kunservisto falis antaŭ liaj piedoj kaj petegis: "Indulgu al mi kaj mi pagos ĉion". Sed li ne volis; eĉ li ĵetigis lin en malliberejon, ĝis li pagos la ŝuldon.

La aliaj servistoj vidante tion, tre malĝojis, kaj rakontis al sia sinjoro ĉion, kio okazis. Tiam lia sinjoro vokis denove lin kaj diris al li: "Malbona servisto! Mi kvitigis vin de via grandega ŝuldo, ĉar vi petegis min. Vi ankaŭ devis kompati vian kunserviston, same kiel mi kompatis vin". Kaj indigninte, la reĝo transdonis lin al karcero, ĝis li pagos la tutan ŝuldon". Kaj Jesuo aldonis: "Tiel same mia Patro, kiu estas en la ĉielo, faros al vi, se vi ne pardonos elkore al via frato".

Mateo estas la evangeliisto kiu, pli ol la aliaj, dediĉas atenton al la temo de pardono. Pro tio ĉe ĉapitro 18 li prezentas Jesuon kiu indikas la neceson de interalfronto kun la frato kiu pekis, kiu plenumis kulpon, kaj la neceson solvi malpacon ene de la komunumo. Se tiu frato rifuzus restarigi tiun unuecon, li devas esti amata samkiel impostisto aŭ pekulo, tio estas senrekomenca amo, kiel la amo al la malamiko.

Petro reagis al ĉi tiu instruo de Jesuo, li alproksimiĝas al li kaj demandas: "Sinjoro, kiomfoje mi pardonu al mia frato", do temas pri la pardonene de la komunumo, "kiam li ofendis min?"

La rabena leĝaro allasis maksimume tri fojojn por pardono. Nu, Petro pensas troigi, li duobligas, kaj diras: "Ĉu ĝis sep fojoj?". Do Petro volas ekscii precizajn regulojn, li volas ekscii la limon de pardono. Jesuo respondis al li: "Ne, Mi ne diras al vi ĝis sep fojoj, sed ĝis sepdek sep fojoj". Jesuo en sia respondo rilatigas sin al famkonata esprimo entenata en Genezo fare de unu el la posteuloj de Kaino, iu viro tre batalema, Lameĥ, kiu fieris ke li mortigis viron pro simpla skrapvundo.

Nu Lameĥ diradis: "Sep fojojn estos venĝata Kaino, sed Lameĥ", nome li mem, "sepdek sep". Do iu senlima venĝo. Kaj la esprimo de Lameĥ referencis al la promeso de Jahveo, de la Sinjoro, kiu diris, ke kiu ajn mortigos Kainon trasuferos venĝon sep fojojn. La referenco, tra ĉi tiuj aludoj, al la unua fratmortigo en la Biblio, kaj la fakto ke la instruo estas adresata al la komunumo de la fideluloj, kie tiuj estas inter si gefratoj, komprenigas - kaj ĉi tiu estas la mesaĝo kiun la evangeliisto volas transdoni al ni - ke la manko de pardono kondukas al la morto la membrojn de la socio.

Estas oportune precizigi, do, ke per la esprimo "ĝis sepdek sep fojoj" Jesuo ne estas indikanta nur la kvanton de la pardono (senliman), sed ĝian kvaliton (senkondiĉan).

Kaj tuj poste Jesuo prezentas tre signifoplenan parabolon. La regno de la ĉieloj, nome ĉi tiu nova realo kiun li venis proponi, estas simila al reĝo kiu venis reguligi la kontojn kun siaj servistoj. Per la termino "servisto" en oriento oni difinas iun ajn subulon de la reĝo. Ĉi tie temas reale pri altaj funkcioj, tion oni vidas el la monsumoj kujn ili mastrumas.

"Ĉe la komenco de la ekzameno oni kondukis al li unu, kiu estis ŝuldanto por dek mil talentoj", iu cifero ekscese alta, absurda. Fakte unu talento egalas je 26 ĝis 36 kilogramoj da oro, nu dek mil talentoj estas proksimume 300 mil kilogramoj da oro, do monsuno nekalkulebla, ne redonebla. Fakte, "Sed tiu ne plu havis monon, per kio pagi; pro tio la reĝo ordonis..."

Ne temas pri fiago, tia estis la tiutempa juro, "ke estu vendataj kiel sklavoj li, lia edzino kaj liaj infanoj, kaj konfiskata ĉio, kion li posedis kaj tiel pagata la ŝuldo". Do la reĝo prenas la iniciaton, vidas ke tiu ne havas per kio repagi la ŝuldon, kaj turniĝas al la ordinara praktiko, tiu de justico. Ĉi tiu servisto petegas sian reĝon kaj diras al li: "Pacienca pri mi, kaj mi pagos al vi ĉion". Neeble! Li scias, ke ne eblas repagi ĉion, ĉar se oni faras kalkulon oni vidas, ke oni bezonus pli ol 164 mil jaroj da laboro por amasigi tian sumon.

Do la servisto scias, ke li ne povas redoni, tamen li petegas de la Sinjoro ke li havu paciencon. Nu, "Kortuŝite". Ĉi tiu verbo uzita en la Malnova Testamento kaj pri Jesuo en la Nova Testamento, indikas iun agon de viscera amo fare de Dio al siaj gefiloj kaj de Jesuo al siaj gefratoj.

“la reĝo liberigis lin kaj kvitigis lin de la ŝuldo”, nome li forstrekis la ŝuldon. Nu, “elirante, tiu servisto renkontis kunulon, kiu ŝuldis al li malgrandan sumon”, iun ridindan monsumon, cent denarojn, kiuj egalas al tri monatoj da laboro, iun sumon kiun oni povas redoni. Nu, tiu administristo, al kiu estis indulgita la enorma sumo de 300 mil kilogramoj da oro en egalvaloro de 164 mil jaroj da laboro, “kaptis tiun ĉe la gorgo, kvazaŭ sufokante lin”.

Li, kiu estis ricevinta la vivon el sia Sinjoro, ĝin forprenas de la alia, kaj postulas, ke tiu repagu sian ŝuldon. Tiu kunservisto sin adresas al li ĝuste samkiel la administristo estis turninta sin al sia Sinjoro, “Indulgu al mi kaj mi pagos ĉion”. Kaj en ĉi tiu kazo estas eble redoni. “Sed li ne volis; eĉ li ĵetigis lin en malliberejon”.

Anstataŭ la mizerikordo, kiu estis praktikita al li, li praktikas la justicon. “La aliaj servistoj vidante tion, tre malĝojis, kaj rakontis al sia sinjoro ĉion, kio okazis. Tiam lia sinjoro vokis denove lin kaj diris al li: “Malbona servisto!...”. Estas grava ĉi tiu termino, ĉar ĝi estas la sama kiun oni retrovas ĉe la fino de “Patro nia”, kiam Jesuo invitas peti “liberigu nin de la malbonulo”. La malbonulo estas tiu, kiu ne kapablas pardoni.

Kaj kiu ne kapablas pardoni semas la morton ene de la komunumo. “Malbona servisto! Mi kvitigis vin de via grandega ŝuldo, ĉar vi petegis min. Vi ankaŭ devis kompati vian kunserviston, same kiel mi kompatis vin”. Kaj indigninte, la reĝo transdonis lin al karcerero, ĝis li pagos la tutan ŝuldon”, tio estas por ĉiam.

Ĉar, kiel ni kalkulis, oni bezonis ĉirkaŭ 164 mil jarojn da laboro, do li neniam kapablos repagi, kaj li iros en la manojn de la karceristoj por ĉiam. Kaj Jesuo aldonas: “Tiel same mia Patro, kiu estas en la ĉielo, faros al vi, se vi ne pardonos - eĉ ne temas pri simpla pardono, sed pri formeto, la iniciato estas de la kreditoro - elkore al via frato”.

Kion signifas “elkore”? Ĝi estas la frukto de nova pensmaniero, kie ne plu superregas justico, sed mizerikordo. En rilato kun tio, kion Jesuo diris pli frue pri ligo kaj malligo, la signifo estas jena: la pardono de la Patro al la homoj restas ligita dum oni ne malligas la pardonon al la gefratoj. Dio jam pardonis nin, sed ĉi tiu pardono fariĝas efektiva kaj efika nur kiam ĝi transformiĝas en pardonon al la aliaj.